

# JUNA ESPERANTISTO

INTERNACIA MONATA — JUNULARA REVUO.

OFICIALA ORGANO DE TUTMONDA ESPERANTO-JUNULARA ASOCIO.


Jaro I.

Januaro-Februaro 1933.

Nr. 1.

REDAKCIO-ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LELEWELA 9 m. 2. (POLLANDO).

Abonprezo eksterlande: Jare . . . . . 2.50 sv. fr.	ĈEFREDAKTORO: <b>EMIL MAYER.</b>	Abonprezo en Polujo: Jare . . . . . 4 zl.
---	-------------------------------------	--



**Mukden — Manĝurio:** Mukden estis antaŭe la ĉefurbo de l' Ĉina imperiestraro, ĝis kiam Ĉefsidejo estis translokgita en la j. 1664 al Pekino. Manĝurina dinastio rezidis en Ĉinlando dum 268 jaroj, ĝis ekekestis de respubliko en la j. 1912.

## SIGNIFO DE JUNULARO EN LA ESPERANTA MOVADO.

En ĉiu sfero de la vivo, la mondo dependas de junularo por efika daŭrigado de bonstato homara. Se junuloj ĉesus akiri scion kaj sperton en aferoj de la mondo, kaj ĉion lasus al maljunuloj, ili mem en la fino, post morto de la maljunuloj, nur malprogresus, kaj devus denove barakti en marĉo de malnovaj problemoj jam antaŭe solvitaj aŭ solvataj. Tio estas elstare vera rilate la Esperantan movadon, kies fina sukceso dependas je sinsekvo de laborantoj, jaron post jaro, ĝis venos efektiva venko. Do, al gejunuloj ni pliaĝuloj forte alvokas, helpi nin porti la torĉon de homa progreso kaj garanti, ke kiam ni ne plu povos partopreni la belan taskon, aliaj ĝin plenumos kaj sukcesigos.

Do, la junularo esperantista memoru, ke al ĝi apartenas tiu inspira laboro — la fina sukcesigo de

Esperanto kaj la internacia interkomprenigo, kiun ĝi promesas al la mondo. Ĉiu juna samideano aŭ samideanino varbu, laŭeble, siajn kamaradojn al la afero; kaj tenu en menso la ideon, ne nur por ke tuja kaj nuna plezuro kaj profito li aŭ ŝi klopodas, sed ke ankaŭ de tiu klopodado dependas la sorto de la lingvo. Eĉ pli ol aliaj gejunuloj, al skoltoj kaj skoltinoj taŭgas la tasko; ĉar ili laŭprincipe celas al tutmonda frateco kaj efektiva amikiĝado internacia. Sen komuna lingvo eĉ la grandaj jamboreoj mem ne povas plene sukcesi; kaj en ordinara vivo, sen tia lingvo okazoj por pli ol »surpapa» amikeco ja estas maloftaj! Do, junuloj ĉiulandaj, restu fidelaj, al la granda afero, — kaj varbu, varbu, varbu!

*Bernard Long.*

(Prezidinto de la XXII U. K. de Esperanto en Oxford.)

## REVIVIĜO.

De multaj flankoj, amikoj skribis al ni sian ĉagrenon pri la malapero de nia junulara organo kaj diris al ni, kia grava perdo estus por nia esp. junulara movado la ĉesigo de nia revuo.

Certe la malapero de „Juna Samideano“ estis vera katastrofo. Ni tute konsentas.

Tial ni decidis revivigi nian junularan organon sur novaj bazoj kun pli forta fervoro, sub nova titolo nome „Juna Esperantisto“, esperante la sindoneman helpo de ĉiuj niaj amikoj; ankaŭ de ĉiuj esperantistoj ĉar nia organo estas la plej efika propagandilo por Esperanto en junularaj rondoj.

Se vi ne abonas gazeton vi ne povas nomiĝi aktiva esperantisto, ankaŭ vi ne deziru, ke ni sendu al vi ĝin senpage. Sciu ke ni bezonas multe da mono por ke ni povu aperadi regule. Via devo — ekaboni tuj la gazeton, instigi aliajn fari same, tiam vi ne estos libervaganda esperantisto, perdita por nia sankta afero, havante ligilon vi estas informata pri ĉiuj okazintaĵoj en la esp-movado, tiam vi estas aktiva kaj eĉ loĝanta en diversa kaj plej malproksima parto de la mondo, vi sentos vin kiel en anaro inter viaj gesamideanoj ĉar per legado de sama gazeto vi estos pensigita kun ĉiuj samlegantoj.

Tiucele ni konsentas sendi samtempe mendintajn ekzemplerojn de »Juna Esperantisto« po favoraj prezoj jen:

5 jarabonoj kontraŭ pago 11.25 sv. fr. (18 50 zl.)  
10 „ „ „ 20 sv. fr. (30.— zl.)

Nia organo estas certe bela, riĉilustrita alloga revuno. Ni do esperas, ke estos faeile varbi abonantojn inter junularo des pli, ke abonotizo estas malmultekosta, do estas abonebla eĉ de la plej malriĉaj. Tial niaj amikoj devas senĉese varbi, varbadi, por ke baldaŭ ni povu eliri pli amplekse.

La organo estas espereble tre interesa. Tio ankaŭ dependas de niaj amikoj, kiuj devas sendi informojn pri ĉio interesa en ilia lando de la junulara vidpunkto.

Do kuraĝe al la varbado!

La rimedoj por revivigi nian karan organon ne mankas: uzu ilin aŭ almenaŭ iun.

Redakcio.

### HELPA PRES-KAPITALO.

Por akceli firme la eldonadon de nia gazeto, ni fondis help-kapitalon. Bonvolu do per libervolaj kotizoj apogi nian laboron. Eĉ plej malgrandan mon-sumon ni akceptas dankeme. Nomojn de la donacintoj ni publikigos en J. E.

Redakcio-Administracio.

Imitinda ekzemplo: Nian preskapitalon subvencis:

S-ro Sennomulo (Kraków)	30. — zl.
S-ro B. Tarnawski (Brzeźnica)	5. — „
Pastro J. Kuczyński (Łuck)	5. — „
S-ro St. Bajszczak (Inowrocław)	50 „

**Koran bondeziron okaze de la  
NOVA JARO!**

## IDEO DE LA FRATECO. (semata inter infanoj.)

Dum la delegitoj de la Ligoj de la Nacioj traktas en la Genevo pri senarmigo de la mondo elparolante belsonantajn projektojn tematajn pri forigo por ĉiam la barbaraj kaj sangaj interkalkuloj de la nacioj, en la malproksima Oriento tondras pafilegoj kaj fluas sango per la torentoj.

Igas tre klara la fakto, ke al la enkorpiĝo en la vivon la ideon de pacigo oni devas iri tra tute aliaj vojoj, kaj ideon de la frateco oni devas inokulo en la homan bangon de la plej junaj jaroj. disvastigi ĝin inter infanoj.

En Parizo certa grupo de la homoj kun bona volo trovis belan penson, kiu lasttempe kreis t. m. »Aliance de bon accueil«. — Societon de bona akcepto — societon de gastamo.

La societo je kies frunto staras sinjoro Hubert Délestree, ĉefo de la kabineto de kleriga ministerio decidis interligi ĉiaman kontakton kun ĉiuj malgrandaj fremduloj, kiujn la sorto alkondukis Francujon kaj kiuj konstante tie loĝas.

Ĉiunonate okazos infanaj kunvenoj, havantaj la celoj de reciproka proksimiĝo kaj ekkono inter la malgrandaj diverslandanoj.

Unua tia kunveno havis lokon pasintan jaron en „Hotel Royal-Conde“.

Partoprenis en ĝi cirkaŭ 4.000 malgrandaj fremduloj, loĝantaj konstante en la Parizo.

Larĝa salono prezentis multkoloran belan vidaĵon ĉar multaj infanoj estis vestitaj nacie, aliaj infanoj alpinglis al siaj vestaĵetoj rubandojn kun la koloroj de la naciaj standardoj.

Malgrandaj Francoj, kiuj ludis la rolon de mastroj, amuzis siajn gastojn, kaj en la estonteco kiam la unuaj glacioj estos trarompitaj, ĉiu el la malgrandaj francoj devas poste preni magrandan fremdulon sub sian specialan zorgon, zorgante ke ili ne sentu sin tro fremde troviĝante malproksime de sia patrujo.

La profito estos duobla: Malgrandaj fremduloj ekkonos ne nur Francujon sed ankaŭ ĝiajn loĝantojn kaj francoj alproksimiĝante al la fremduloj povos ekkoni pli proksime la kulturon kaj morojn de la popoloj el diversaj landoj kaj, se iam la sorto jetos ilin fremdlanden, ili trovos tie amindajn amikojn — amikojn el la infanaj jaroj.

Artistoj el la plej grandaj parizaj teatroj komprenante grandiozecon de ĉi tiu soleno kaj dezirante plibeligi kaj pliagrabli la akcepton de la junaj fremduloj, gastantaj sub franca ĉielo, amuzis ilin borege per sia programo kiun la infanaro etuziasme aplaudis.

La agado astas disvastigota en la aliaj urbo en Dijon. Bordeaux, Strausburg kaj Lille oni jam fondis specialan komitaton de la »Societo de la bona akcepto«.

La ago estas imitinda precipe en la centroj, en kiuj troviĝas pli granda kvanto da eksterlandanoj.

Estas tre dezirinde ke la gravaj esperantaj organizantoj en la Parizo ekokupiĝu pri la afero. Ĉu ne estus bone se la komitatoj de societo »De bona akcepto« ekkonu pli proksime la internan ideon de la esperantismo?

Ĉu la amikeco inter la menciitaj malgranduloj ne estus pli profunda, se oni ĝin ligus sur la bazo tute neŭtrala, ne nacia?

La afero estas tre grava kaj enkonduko de Esperanto en la societon de »Bona akcepto« estus grandioza gajno por nia paca laboro.

# Tutmonda Esperanto-Junulara Asocio

Prezidanto: D-ro William Perrenoud.

Centra Oficejo: Rudolf Kutzli, Scheibenackerstr. 6, St. Gallen

SVISLANDO.

## LA IDEALO DE TEJA.

Vi, membroj kaj amikoj de Teja. deziras scii precize, kion nia asocio celas.

Mi komprenas vin. Vi volas havi ne sekan teorion, sed respondon klaran, kiu kontentigu vian atendon. Bone! Direktu do vian firman atenton al la afero. Mi estas certa, ke vi komprenos.

S-ro TH. Kutzli, Direktoro de Teja. kaj mi, ĝia Prezidanto, havas unu saman ideon. Mi gvidas la asocion spirite, dum li tre sindone faras la grandan laboron de administrado. Estu al li dankemaj pro lia penado!

Nia komuna ideo estas: *montri al la junularo la grandecon de l'esperantista idealo*. Ĉar grandaj faroj plaĉas al junuloj, kaj de l'junuloj dependas la sorto de Esperanto.

Jes, Esperanto bezonas vin, kaj vi ankaŭ, volante fariĝi veraj homoj, nepre bezonas Esperanton.

Kial do ni ne ligu vian idealon kun la nia?

Rigardu bone: Ĉu ne atendas vin en la mondo unu granda tasko? Nome: *labori por vastanima, ĉiuhoma kulturo, prenanta la tutan mondon por sia bazo: ebligi pli da justeco inter homoj; respekti en ĉiu homo la animon, kiu donas indecon al la vivo*.

Guste tion Teja rigardas kiel sian taskon.

Kiel nia asocio tion efektivigos? — Per obstina, honesta klopodado; per reciproka sinhelpado de siaj membroj; per personaj iniciatoj; fervore, ĝoj-kore, farante sian tutan eblon.

La rimedoj? — Bonorda, plej simpla administrado; aparta rubriko en la simpatia gazeto »Juna Esperantisto«. Ni antaŭvidas ankaŭ servon de korespondado kaj eble eldonadon de kelkaj broŝuroj. Cetere, ni kredas je l'sentenco; »Kie estas volo tie troviĝas vojo«.

Ricevu ĉiu el vi mian koran manpremon.

Dro William Perrenoud

Cernier / Svisujo.

Konservu zorge tiun ĉi numeron kaj komuniku ĝian enhavon al viaj amikoj. Dankon. (Red.)

## TEJA. HAVAS NOVAN KOMITATON!

En aŭtuno de la lasta jaro la ĝisnuna komitato de TEJA. disvolviĝis. Dum kelkaj jaroj ĝi gvidis nian asocion, fidele al niaj idealoj konsciante la gravecon de nia afero. Kiel preskaŭ ĉio, nia asocio suferis pro la krizo universala. Ĝi neniam estis tre riĉa kaj devis ekzisti dum la lastaj jaroj sen oficiala organo aŭ ia interligilo. Kompreneble, ke la asocio perdis multajn membrojn. Krom tio la administra aparato ne plu bone funkciis — malkorektaĵo en la organizo. La komitato certe kaj sendube konsistis el bonaj kaj fervoraj esperantistoj, sed ili ne loĝis en la sama loko aŭ lando kaj tial ne kontentige povis kunlabori. Sekve la komitato disvolviĝis ja komisiis la ĉefdelegiton de TEJA. por Svislando, S-ron Rudolf Kutzli en St. Gallen, por ĝisfunda reorganizado de la asocio Ni nun havas novan ofi-

cian organon, kiu certe treege plaĉos al ĉiuj membroj. En plej proksima tempo TEJA. havos novan statuton kaj ĝi estas nun en la esperiga stato.

La svisa ĉefdelegito nia starigis novan komitaton, konsistantan el la certaj kaj spertaj esperantistoj, nome:

S-ro Dro. William Perrenoud, Cernier, Svislando, Prezidanto.

S-ro Theo Kutzli, St. Gallen, Svisl., Direktoro.

S-ro G. Falkner, St. Gallen, Svisl.

S-ro Rudolf Kutzli, St. Fiden - St. Gallen, Svisl.

La nova komitato de TEJA, unue esprimas koran dankon al la ĝisnuna komitato de TEJA. por la granda kaj bona laboro farita. Speciale la ĝisnuna prezidanto de TEJA. S-ro A. Csáder en Bratislava, kaj la ĝisnuna ĝen. sekretario, S-ro A. Neuppert en Leipzig, meritas la estimoplanan dankon de la tuta membraro.

La laboro estas komencata sur tute nova bazo.

Ĝi certe estos tre granda kaj ne ĉiam facila kaj agrabla. Por ke la alta celo estu atingota, ni nepre bezonas la kunhelpon de ĉiuj! Ni speciale alvokas nian ŝatan delegitaron, rekomenci per novaj fortoj la celkonscian vorbadon por nia afero.

Se ni ĉiuj unuece marŝos, la sukceso estas certa. Ni do koncentrigu ĉiujn fortojn por efektiviĝi la altan idealon de komuna mondlingvo por ĉiuj popoloj kaj por ebligi ĝian praktikan uzadon.

R. K.

## SCIIGOJ DE LA CENTRA OFICEJO.

Al S-ro Ministro H. Seivers en Braunschweig ni esprimas nian koran dankon por la sendita suno de g. 25 — kiel simpatiesprimo al nia asocio!

Franĉujo: Nova ĉefdelegito: M. A. Bode-rau, 212, Boul. J. J. Rousseau, Le Mans, Sarthe.

Neuilly sur Seine: loka del.: Pierre Bertrand, 61 Avenue de Neuilly, (Seine).

Sovetunio: Ĉefdelegito: Petro Syrjanenko, Valki, Harkovska oblast, Ukrainio, U. S. S. P.

Polujo: Równe-Woł: distrikt-del. por Wołyń: Mordko Icekzon, Równe-Woł., ul. Jagiellońska 39.

Nederlando: Rotterdam, loka del.: A. C. v. Jugen, instruisto, Craandykstr. 3E, Rotterdam-West.

Belgujo: Brugge: loka del.: Roger Meerseman stud., Gapaardstraat 22, Brugge.

Svislando: St. Gallen: loka del.: Otto Dornbierer Güetlistr. 4, St. Gallen 0.

Al ĉiuj demandoj al la Centra Oficejo aŭ al delegitoj bonvolu kunmeti respondpagilon!

## AL LA ESTIMATA ĈEFDELEGITARO.

Bonvolu ture regule sendi al la Centra Oficejo viajn raportojn je la fino de ĉiu kvaronjaro kaj ankaŭ sendi la adresojn kaj ĝo procentojn de la kotizoj de la novaj membroj.

Ne forgesu pagi vian kotizon por 1933!

La jarkotizo de Teja estas;

Por subtenantoj	sv. fr. 10 —
por membro-abonantoj	” 3.50
por membroj	sv. fr. 1.50

# TRA ESPERANTUJO.

25 Universala Kongreso de Esperanto en Köln  
29 julio — 5 aŭgusto 1933.

La adreso de Loka Kongresa Komitato estas:  
25-a Universala Kongreso de Esperanto, Trajanstrasse  
25, Köln, Germanujo.

Jam 150 aliĝoj el 18 landoj. Pli ol 300 anoncis  
sian partoprenon.

## ESPERANTO ĈE LA PUBLIKAJ LERNEJOJ EN BRAZILIO

Dum la pasinta jaro funkciis kursoj de Esp.  
en la publikaj lernejoj »Barbara Altoni» kaj »Rodri-  
gues Alves» direktitaj, respektive, de d-ro E. Backen-  
heuser kaj inĝ. A. Conto Fernandes. La unua kurso  
estis speciale por instruistoj kaj aliaj por gelnantoj.

La estraro de Brasila Ligo Esperantista vizitis  
la novan direktoron de la Publika Instruado, d-ron  
Anisio Teixeira, kiu promesis helpi la propagandon de  
Esp. permesante kursojn en la normala kaj en aliaj  
lernejoj.

## ITALA ESPERANTO-FRAZARO POR VOJAĜANTOJ.

La faŝista Fervoja Poŝtlaboro de Torino eldo-  
nis kvarpaĝan kartonan broŝureton kies enhavo kon-  
sistas el praktika bone ordigita »Frazaro por la Vo-  
jaĝanto». La libreto estas senpage havebla ĉe:  
Dopolavoro Ferroviario, Via Lacchi, 25 bis, Torino  
Italujo.

## Ligo de Nacioj uzas Esperanton.

Malmultaj pensas pri tio, ke inter la organizoj  
uzantaj esperanton troviĝas la Internacia Labor-Oficejo  
(Ligo de Nacioj), Ĝenevo. Informo ĉiuspecajn pri  
laborkondiĉoj oni povas bonuzi skribante en Esperanto.

## Lingvo-Babelo en la mez-lernejoj.

El Bucuresti oni raportas: Laŭ plej nova in-  
struad-programo lernas gimnazioj la sekvantajn  
lingvojn: en la 7. kaj 8. klasoj la grekan, ekde la 3.  
klaso la latinan, de la 4. la francan, la germanan de  
la 5. kaj la anglan en la lasta (8) klaso. Krom tio  
estas ankaŭ unu slava lingvo deviga instruobjekto kaj  
laŭ la geografia situacio de la lernejo povas elekti  
la direktoro inter la ĉeĥa, serba, pola kaj bulgara  
lingvoj.

## Pola Radio favoras Esperanton.

Jen ĉefa kampo, kie Esperanto trovas sian lo-  
kon — Pola Radio — jam pliofte donas prelegojn en  
esp. lingvo. Prefere el radio-stacioj (Varsovio, Krakovo).  
Ni esperu, ke ankaŭ aliaj urboj sekvos. Vi tamen ĉiuj  
helpu al ni sendante al »Polskie Radjo» poŝtkartojn  
kun gratuloj!

## Propagandas Esperanton.

S-ro Kola Ajayi, nigrulo el urbo Lagos (Liberio,  
okcidenta Afriko) ĉirkaŭvojaĝas polajn urbojn kun tre  
interesaj prelegoj en la esperanta linvo je temo:  
»Vivo de la nigruloj en Afriko, Ameriko kaj pri ni-  
grula muziko».

La Asocio de Nederlandaj instruistoj por  
Esperanto.

La plej grava instruista organizo ĉe elementaj  
lernejoj kongresis en la fino de pasinta jaro. La kon-  
greso akceptis proponon akceli, ke Esperanto estu  
akceptata en la instruleĝo kiel nedeviga fako por la  
sepa klaso de la elementaj lernejoj. Same la kongreso  
akceptis proponon, laŭ kiu la kongreso petis la instru-  
ministron oficialigi la esperantajn ekzamenojn.

H. W. A.

En Kolding (Danujo). La policistoj scias  
Esperanton kaj havas permeson porti la verdan stelon  
sur la uniformo.

\* \* \*

— Oni diras, ke nune prepariĝas, ĉe Holly-  
wood, filmo en Esperanto, en kiu la bela aktorino  
Marion Marsh ludas la ĉefan virinan rolon. Ŝi lernis  
Esperanton en kelkaj monatoj.

\* \* \*

— En Ateno. D-ro Stamadiadis gvidis  
kurson en la oficiala lernejo de P. T. T. laŭ decido  
de la ĝenerala direkcio

\* \* \*

— La ĉeĥoslovaka ministerio de P.T.T.  
permesis uzadon de Esperanto por la amatoraj ra-  
diosendoj.

\* \* \*

Stockholm (Svedujo). Lokan esp. kunvenon  
vizitis la mondfama blinda pianisto Imre Ungar el Bu-  
dapest, bona esperantisto, kiu antaŭ kelka tempo gaj-  
nis la premion de la Chopinkonkurso en Varsovio  
(Pollando). Dum lia vojaĝo li koncertis sukcesplene en  
Lantvujo, Litovujo, Estonio, Anglujo, Nederlando, Hun-  
garujo, Danio kaj Svedujo — senĉesa ĉeno de la  
sukcesoj. Kaj nenie li forgesis pri la esperantistoj.

\* \* \*

Debrecen. Hungarujo. S-ro Kardos — prezidanto  
de Komercista Asocio pro nesis enkonduki la instruadon  
de la lingvo Esperanto en la Komercista Akademio.

## ESPERO AL PLI BONA TEMPO.

En la mondon venis granda krizo  
Tra la mondo iras maldungado  
La mond ŝanĝiĝas malparadizo  
Kaŭze de la salajro tranĉado.

Nia mono malaperas ien.

Poŝon malplenan lasante vian

Ĉiu kombiojn protestas ĉien

Ne pagante unu la alian

Por ŝangi la danĝeran aferon

Tuj kontraŭstaru ĉiu vivanton

Unisone ekkantu »Esperon«

Kaj propagandu la »Esperanton«.

Hebdowski.

NE PROKRASTU ĜIS MORGAŬ KION VI POVAS FARI HODIAŬ:  
SENDU ABONKOTIZON POR „JUNA ESPERANTISTO“

# El la junulara vivo.

## LA UNUA ESPERANTISTA GRUPO JUNULARA EN RUMUNUJO.

Antaŭ kelka tempo oni fondis la Esperanto-Grupon de la Protestantă-Kalvinana Junulara Asocio en Timișoara (Banato), kies celo estas: disvastigi Esperanton Ĝenerale la ĝejnularo, sed precipe inter la Kristana ĝejnularo, kaj uzi Esperanton kiel interkomprenilon inter la diversnaciaj kristanaj organizoj, asocioj, komunumoj kaj individuoj. La grupo jam en la pasinta jaro komencis gvidi Esperanton kurson en sia monata revuo protestanta, en »Ifjú Erdély«, kiu bone progresas kaj efike propagandas por nia lingvo kaj ideo. La revuo krome en sia Ĝenerala parto (en la literatura) enhavis jam kelkajn bonajn propagandajn artikolojn per Esperanto kaj en alia parto ankaŭ pri Esperanto. Tiu ĉi revuo estas la unua agadkampo de la nova grupo. La diligenta klopodado de la grupo ankaŭ en la societejo ne estas senefika. Ĝi aranĝis jam kelkajn prelegojn pri Esperanto kaj prezentis sian unuan Esperantan propagando-prezentadon, kiu ankaŭ morale kaj ankaŭ materiale kontentige sukcesis. La unuan oficialan kurson la grupo nun gvidas Ĝin partoprenas dudekelkaj ĝejnuloj, inter ili ankaŭ skoltoj. La kurso baldaŭ finiĝos kaj dum la ekzamena festo estos elektata la nova grupestraro.

J. Gs.

LA UNUA ESPERANTO-PREzentado DE LA NOVA GRUPO okazis pasintan jaron en la kunvenejo de la Prot. Kalv. Junulara Asocio, kiu bone sukcesis. Krom la esperantistaro de Timișoara partoprenis la prezentadon — kiu okazis esperante — kaj hungarlingve ankoraŭ bela nombro de la interesiĝantoj. Agrable efikis la versa prologo de malgrandeta lupideto Páulö Andrëka; li deklamis hungaran kaj esperantan versojn, modele akcentante kaj prononcante la esperantan tekston. Multe beligis la tutan vesperon kaj multe kontribuis al la alta nivelo de la prezentado la kantsoloj kaj kantduetoj de F-inoj Elisabeto Divöky, Vilhelmino Kutly kaj de S-ro Andreo Molnar, ĉiuj tri membroj de la prot. — Kalv Junulara Asocio Bn-humoron kreis la artifikajoj de S-ro Stefano Recsányi, kiu prezentis kelkajn interesajn sorĉaĵojn, magiaĵojn kaj manlertaĵojn. Bone sukcesis la hungar — kaj esperantlingva skolttema propaganda teatraĵeto; La vojo de l'kompreno, kiun verkis la hungarlanda ĉefagento de Sel, kaj kiun prezentis la membroj de la Reformata Skolta Trupo. Ankaŭ ne mankis la tielnomataj pli seriozaj proprameraj: S-ro Stefano Recsanyi tenis paroladon pri Esperanto por la hungarlingva publiko; s-ro Julio Csapö parolis pri la finna literaturo kaj poezio, kaj prezentis la Kongresan Runon de K. de Kalocsay; en alia programero kun enkondukajo li prezentis aliajn poemojn de Kalocsay kaj de Baghy. La programon finis humora poemo deklamprezentita de Ervineo Alshek kaj kelkaj Szabolcska-anegdotoj. La harmonium akompanadon prizorgis S-ro Aleksandro Csapö, ankaŭ membro de la Esperanto-Grupo. La aranĝadlaborojn faris la Reformata Skolta trupo Trupo, kaj menciinda estas, ke ĝi bone kunhelpis sukcesigi la vesperon, kantante esperante la hungaran skoltmarŝon kaj fervore farante la teknikajn laborojn de la vespero. Certe la reformataj skoltoj tiuvespere gaje povis defari la nodojn sur siaj kravatoj, ĉar ili certe plenumis »bonan laboron«.

Jen — la — Bat.

## Nova Esperanto Rondo.

Ĉe la la stata klasika Gimnazio en Bydgoszcz, Polando fondiĝis nova junularo-grupo kun pli ol 30 membroj. Kun granda ĝojo ni notas novan sukceson de Esperanto en ĉi-tiu urbo kaj ni gratulas al ĝi plej sukcesplenan laboron. (Imitu aliaj urboj.)

**Brunnsvik** (Svedujo). En la fama altpopollernejo Brunnsvik la lernantaj de la ĉijara kurso havas sufiĉe grandan intereson por Esperanto malgraŭ abunda kursplano kaj la multa okupo por la pristudo de ĝi, geknaboj tamen dediĉas tempon por la internacialingva afero.

**Tallinn** (Estonio). La anoj de la Esp. fako ĉe Tallinna junsocialista Unuiĝo partoprenis ekskurson al junsocialista Kongreso en Helsinki.

**Agneberg** (Svedujo.) Inter la membroj de socialista ĝejnulara asocio komensiĝis esperanto-studrondo kun 19 partoprenantoj. Gvidanto estas s-ro Folke Bergqvist el Lärje.

**Axevalle** (Svedujo). En popolalt-lernejo s-ro H. Frisk gvidas esperanto-kurson. Proksimume 30 ĝejnuloj partoprenas.

**Minas Gerais - B. Horizonte** (Brazilo). Post iom da ripozo revenis al la laboro por Esperanto »Junulara Esperantista Societo«. Oni kunvenas ĉe la sidejo de la lernejsra Direktoraro de la studentoj. Prezidas s-ro Geraldo Padua.

**Kraków** (Pollando), Lasttempe la junulara esp. movado multe plivigliĝis. Oni gvidas kursojn en diversaj organizacioj ĉe fervojoj, skoltoj kaj laste la socialista organizacio T. U. R., malfermis multinomban kurson kiun gvidos S-ro Osiek.

Pri sigifo de Esperanto por proletaro prelegis s-ro Swaryczewski.

En plej proksima tagoj Eldonejo de »Juna Esperantisto« malfermos esp. kurson por la krakova publiko.

**Plock** (Pollando). En la lasta tempo mariavita junularo organizis asocion »Templazyusz« — Templanoj — kiuj intencas kunlabori kun ĉiuj ĝejnuloj. Asocio kalkulas kelkdek personoj.

**Lublin** (Pollando). Dank al la direktoro de lublina gimnazio kaj dank al s-ro Kukulski, kaj prof. s-ro Zablocki ĝia kuratoro, esperanto-movado multe plivigliĝis. Oni gvidas esp. kursojn. Multe laboras en la grupo s-ro M. Klimowicz ĝia gvidanto.

**St. Gallen** (Svisujo). La tre vigla Esperanto junulara-grupo »Verda Stelo« okazigis specialan amuzan varifeston por lernantoj dum vintro. Ni gratulas!

**Kiev**. (SSSR.) La pedagoga Katedro ĉe la Kieva Instituto por la popola instruado estas decidinta komenci sciencajn provojn koncerne de eduka valoro de la lingvo Esperanto.

**Zagreb**. (Jugoslavio) La studenta esperantista societo en Zagreb estas ricevinta 500 dinarojn, subsideion, de la Komerca Ĉambro.

**Prago**. (Ĉeĥoslovakujo). La ministerio de la Instruado per oficiala ordono oficigis s-ron A. Pitlik kiel Ŝtatan ekzamenan komisaron pri Esperanto en Ĉeĥoslovakujo lernejoj.

**Bresĉia**. (Italujo). En la nova programo de Faŝista Kultura Instituto estas enlokita laŭ punkto 9, la lerno de la lingvo Esperanto en la Instituto.

# „P A C O“

## Pacifista Parto.

# MANIFESTO!

### En la nomo de la

# MONDA PACO

Pasas 14 jaroj de la batalhalto post la sanga mondmilito — kaj nenia nacio, kiu partoprenis la militon, scipovis ĝis hodiaŭ tago rebonigi la detruitajn vivon, kio kaŭzas rezulte, ke la Homaro preskaŭ sur la tuta terĝlobo vivas sur la vulkano, en la ĉiama vegetado mastruma kaj en la konstanta antaŭtimo pri la novaj krimaj venĝoj militaj.

Ni devas memori, ke:

10 milionoj 642 miloj da mortigitoj,

22 milionoj da vunditoj.

12 miloj da blindaj kaj maro da sango

— jen ofica bilanco statistika de la lasta Mondmilito. Kaj kiu scipovos prikalkuli tiujn, kiuj pereis ne pro kugloj, bajonetoj granatoj kaj venenaj gasoj, — sed pro la malsanoj, pro mizero kaj malsato, kiuj akompanis daŭrantan militon? Kiu prikalkulos suferojn kaj doloron de patrinoj kaj georfinoj, kies parencoj pereis sur la militkampoj en la plej teruraj turturoj?

Haltiĝo, kiu ekestis en la internacia mastumado post tiu-ĉi terura ĝenerala detruo, estas kaŭzo, ke malgraŭ 14 jaroj daŭranta paco — pli ol 25 milionoj da senlaboruloj pereas pro malsato kaj mizero — ĉiam atendante pliponigon de la vivkodiĉoj.

Estas la plej alta tempo — ke la socioj de ĉiuj landoj komprenu ke,

248 milardojn 421 milionojn da dolaroj englutis

la kostoj de la lasta Mondmilito, per kiu sumo oni povus (ĉe la nuna stato de la tekniko) doni bonfarton al la vastaj homamasoj anstataŭigante hodiaŭan mizeron.

Ni tamen ne permesos, ke la sovaĝa malamo de la ŝovinismo konduku nin al la nova milita buĉado.

Nuntempaj eltrovoj kaj militoj ne konas barojn kaj ili kaŭzas neantaŭvidatajn kaj terurajn vivoferojn kaj perdon de homa havaĵo, — detruante Civilizacion de la Mondo. Estas tute kompreneble, ke ĉi-tie ne helpas konferencoj de la diplomatoj penantaj forigi politikajn miskomprenojn — se la socioj mem ne ekstaros sub unu standardo por la plej sublima ideo — ideo de la ĝenerala paco — kaj en la reĉiproka unuiĝo ekokupos la postenojn kontraŭ fratmurdaĵo, sangoverŝoj kaj ĝenerala detruo de la vivo per la milito.

Ĝuste tiu-ĉe kun la kreskanta pacifismo fondiĝis.

Konflikto inter Paragvajo kaj Bolivio.

[I. T. F.] La Argentina Fervojista Sindikato decidis rifuzi la transporton al la militoj, bezonataj por la konflikto inter Paragvajo kaj Bolivio kaj alvokis ĉiujn fervojistojn de Suda Ameriko, fari la samon.

Kvakerismo kaj paco.

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn, de literaturo [Esperanta kaj Angla] pri kvakerismo kaj paco por disdoni.

Ligo de Monda Paco, kiel institucio internacia kaj ĝenerala-homa, celanta disvastigi la ideon de la Paco en ĉiuj socioj, sendepende de la diferencoj naciaj, religiaj kaj politikaj.

Ligo de la Monda Paco celas plibonigon de la kondiĉoj ekonomiaj-mastrumaj per la forigo de la baroj doganaj por la libera evoluo de la internacia industrio, komerco kaj la libera interŝanĝado de bienoj, — kaj per tio-ĉi mem agas al la batalo kontraŭ la monda senlaboreco.

Ligo de la Monda Paco kunlaboras en la edukado de la junularo, per tio-ĉi de la estontaj generacioj, en la kulto de la plena unueco, frateco kaj amo de la proksimulo, por la reciproka kaj plena paco en la homaro.

Ligo de la Monda Paco — estas frunto de la milito kontraŭ milito.

Ankoraŭ hodiaŭ ekstaru en niaj vicoj kun la alvoko; — Ĉion por la paco en la nacioj!

Venu la tago, depost kiu la tuta mondo ekestu unu libera kunigita patrujo, kaj per tio-ĉi mem lulilo de la frateco kaj amo inter ĉiuj Nacioj!

Tiu-ĉe devas ĉiu socio, urbo, vilaĝo kaj ĉiu grupo de la homoj dezirantaj firman pacon fondi Ligon de la Monda Paco — kiel ĉenoj de la unueco.

Ĉiu devas esti konstruanto de la Monda Paco!

Do; En la nomo de la kompreno civilizacio kaj progreso.

Por la sendanĝereco kaj defendo de la homaj rajtoj;

— Defendu fidele pacajn kondiĉojn!

— Iru sub standardojn de la Ligo de la Monda paco!

Por la reciproka frateco kaj paco en la Homaro!

Ligo de la Monda Paco — Jen ĉeno por unuiĝo de ĉiuj nacioj, kie neniu povas manki!

Fondu Ligon de la Monda Paco en ĉiuj landoj!  
— estu anoj!

**Ligo de la Monda Paco, Centra Oficejo**  
Kraków, pl. Matejki 4 Polujo).

Bonvolu peti per ilustrita poŝtkarto aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

Adreso: Dr. Fred. J. Williams, Samai, Papua Aŭstralio.

Afd. Bussum [Svedujo]. La grupo por »Esperanto al mondpaco« aranĝis ekspozicion sub propraj aŭspicioj.

# Skolta Esp. Movado

## JAPANUJO - ĤINUJO AMIKIGU-PER LA SKOLTOJ.

Situacio je malproksima oriento ĝis nun ankoraŭ ne plene estas klarigita, kaj sur tereno de nova »sendependa» Manĝurio aŝtato la japanaj militistoj batalas regul-milite kun ĉinaj ribelantoj. Super ĉio aldone en ĉi-tiu malfeliĉa lando regas naturaj katastrofoj jen superakveco de la terenoj kaj diversaj malsanoj (tifuso), kiuj malte plimalmultiĝas lokan loĝantaron.



Manĝurio: Ripozmomento kun pipeto post ĉiutaga laboro.

### AL ĤIUJ S. E. L. AGENTOJ!

Via deŭo estas zorgi, ke ankaŭ via priskribo de skolta esp-movado en vivlando troviĝu en la aperonta »Libro pri esp. skolta movado» prilaborata de s-ro Emil Mayer (S. E. L. agento) por Pollando Kraków, Lelewela 9 .m. 2. Postulu detalojn. Sendu tuj Viajn materialon!

Manĝurio: En la varmeta manĝuria klimato estas kulturitaj egalrajte la ĉiuspecaj grenoj, same kiel diversaj vinberoj kaj fruktoj. Krom tio oni trovas tie grandegaj mineral-negocoj.

En la sanga dramo de la malproksima oriento eksonis ankaŭ skolta voĉo. Ankoraŭ malgranda, sed ni esperu, ke sincera, ĉar tiam ĝi estas serioza promeso por pli bela estonto:

»La Syonendan-Kenkyu» japana skolta revuokiu oni devas legi de malantaŭ antaŭen kaj de supre malsupren, kondiĉe ke oni scias la japanan lingvon. Ni certe ne komprenas ĝin sed ĝi enhavas tekstojn ankaŭ en angla lingvo. Inter ili estis publika letero de la japanaj skoltoj al du skoltaj trupoj en — Shanghai. Ili bedaŭras, ke estas batalo inter la du nacioj kaj tial ili ne povas plenumi la pli frue promesitan taskon: printempe labori kune por amikigi la du naciojn. Sed ilia deŭo estas pluen labori por la plia proksimiĝo, ke estonte oni evitu tiajn okazintaĵojn.

Esperante, ke la amika rilato inter la du fratnacioj baldaŭ restariĝos, la japanaj skoltoj salutas ĉiujn ĉinajn skoltojn.

Jen ideala skolta pensado! Kio mankas? — Ke simile komprenu unu la alian la skoltoj de ĉiuj nacioj. Sed tio ne estos ebla-kaj tion ni speciale diras al malproksima Syonendan-Kenkyu — la angla lingvo, por tio necesas nia Esperanto!

Skoltfratoj, skribu al la japana skolta gazeto, petu, ke ĝi ankaŭ esperante aperigu la tekstojn por alilandaj fratoj kaj petu de ĝi adresojn de japanaj skoltoj por korespondi Esperante.

(Adreso: Syonendan Nippon Renmei, Monbusyĉ Building, Tokio.)

### OFICIALA ESPERANTO RENKONTEJO ĈE MOND. SKOLT-TENDARO.

La tendarestro de la skolta mondjamboreo, eksministro grafo Paŭlo Teleki, aprobis oficiale esperanto-renkontejon ĉe la mondkunveno de la skoltaro, akazonta 4-16 aŭgusto apud Budapeŝt kaj komisiis la 199-an hungaran trupon por tiu laboro. Kompreneble necesas, ke vere venu alilandaj skoltoj, kiuj scias Esperanton. Tio dependas de la esperanto-societoj kaj grupoj, ĉu ili aranĝos sukcesajn kursojn.



## SKOLTA KRONIKA.

**Australio:** S-ro Matt Lew Duncan el Perth, vigle propagandas Esperanton en loka skoltaro. Gratulon!

**Brazilo:** S-ro Guilherme Azambuja Neves, prezidanto de la Federacio de Brazilaj skoltaj propagandas Esperanton. Li parolis per radio pri »Skoltismo kaj Esperanto« kion du grandaj junuloj represis.

»O Jona!« aperigis artikolon de s-ro. Pedro Cardoso, prezidanto de C. M. E., pri Esperanto, kiel helpingo de skoltismo.

La 5-an de Marto dum »Skolta Nokto« deklamis kaj kantis en Esperanto du finoj.

La prezidanto de la Federacio de Skoltoj de Brazilo, s-ro. Azambuja Neves, 2-a sekretario de Brazilo Esp. Ligo, parolis per Radio Club de Brasil» pri »Skoltismo kaj Esperanto«.

La paroladon publikigis la ĵurnaloj de Rio de Janeiro. Li promesis fari propagandon por la jamboreo okazonta en 1933, ke la skoltaj lernu Esperanton. (Imitu en via lando!).

**Braĥislava:** La estraro de la skoldistrikto Braĥislava favoras Esperanton. Per dekreto Ĉ. j. 92/1931. de 30 XI 1931. oni nomis fraton Kolomano Kiss »distrikta instruitoro« de Esperanto.

Nomita gvidas kurson por 17 anoj de la hungara skoltina trupo »Kiskárpátok«, kies estrino estas tre favora Kursoj por aliaj trupoj en preparo.

»Skaŭt« la oficiala organo de la slovakaj katolikaj skoltaj aperigas en ĉiu n-o en-kaj priesperantajn artikolojn de sia redaktoro tech. stud. Alojz Macek.

**Holice u Olomonce.** Frato B. G. Podebrad eklaboris por organizi la S. E. L. sekcion en Ĉeĥoslovakujo.

**Košice** La organo de la slovak skoltaro »Bud, Pripraveny aperigas priesperantajn, de sia redaktoro s-rano lariza.

**Nove Zámky** La hungarlingva junulara kaj skolta gazeto »Tábortűz« hufavas ofte artikolojn pri Esperanto kaj skolta vivo.

**Praha** Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista elektis s-anon Csáder kunlaboranto por skolta afero.

**Germanujo:** El Radiostacio-Breslau: F-ino Korschate kaj el Radiostacio-Stuttgart: s-ro. Vogt parolis dum esperanta prezentado pri la skolta jamboreo en 1933 kaj pri uzo de Esperanto inter skoltaj! Koregan dankon al ili.

**Hungarujo.** (Budapest) la 6-an de marto skoltaj esperantistaj sub ia flago de la skolta Esperanto rondo partoprenis skoltfeston en la Nacia Gimnastika Halo antaŭ kelkcenta publiko. Ĉe sceno prezentante internacian tendarfajron, ili almarŝis kantante, sub la verdstela flago kaj post salutoj kantis esperante hungarajn kantojn. Andreo Szikszay kantis ankaŭ sole kun granda sukceso. Multaj ĉeestantaj instruistoj kaj gepatroj tiamaniere ekkonis Esperanton kaj ĝian signifon por skoltaj.

**Budapest.** En gimnazio estis koresponda ekspozicio, kie trionon okupis esperanto-korespondado de skoltaj. Ĵurnaloj raportis.

**Csongrád.** Ĉe publika skolta festo unu numero estis: Esperanto kantado de esperantistaj skoltaj. Ĝi estas imitinda ekzemplo popularigi esperanton antaŭ la publiko.

**Kőszeg.** Fondiĝis esp. sk. rondo.

**Makó.** Fondiĝis esp. sk. rondo.

**Moson.** Fondiĝis Stolta E Rondo. Delegito L. Bergl komencis la unuan kurson en tiu ĉi urbo kun 20 partoprenantoj.

**Szeged.** La episkopo vizitis la korespondan ekspozicion en skolta hejmo, kies pli granda parto estis esperanto korespondado el 52 ŝtatoj. Gazetoj raportis:

**Jugoslavio:** En Brod S/S propagandas Ĝorĝe-Moškijeviĉ sekretario de la loka skolta trupo.

**Norvegujo:** Kurson por 20 skoltaj komencis s-ro Arne Arnesen kaj por 50 skoltaj s-ro. dro. O. Fischer. La ĉefskolto norvega promesis subtenon de Esp. Dro O. Fischer jam antaŭ 500 skoltaj parolis pri Esp. En skolta gazeto aperis artikolo de C. Lea, SEL. agento

**Bydgoszcz.** En la 5-a skoltrupo sub la nomo »Zawisza«, oni fondis grupon da skoltaj esperantistoj konsistantan el 10 anoj. Ĉe la gimnazio estas fondota »Rondo Esperantista«.

**Lwów.** Skolta revuo »Skaŭt« aperigas ĉiumonate »Esperantan Angulon« kaj en ĝi pritaktas aferojn de la skolta esp. movado en la mondo ktp. Progreso de ĉi tiu fakto oni devas danki al la redaktoroj de ĉi tiu revuo.

**Rumanujo.** Cluj. »Ió Barát« hungarlingva revuo por skoltaj kaj junuloj aperigas Esperanto-kurson en 6 partoj. Oni aranĝis konkurson por la kursanoj, kiun partoprenis 11 gejunuloj.

## HUMORO.

— Ĉu Viaj infanoj jam interkonatiĝis kun infanoj de la najbaro. — Jes, mia plej-aĝa infano jam haves truan en la kapo.

— Je la bankedo de konata ĵurnalisto ĉiuj finis sian gratulon kun la vortoj: »Vivu la ĵurnalisto. La ĵurnalisto: De kie preni por vivi.

## KORESPONDADO:

(Anoncetoj, pri korespondado kosta 0.50 fr.-sv. (1 zł.) ĝis 20 vortoj. Niaj abonantoj rajtas enpresigi unufojan anoncon senpage.)

**Ĉeĥoslovakujo:** Korel Tauchman, Semily Ĉ. 91 iŝ p. i. fj. bfl.

**Hispanujo:** S-ro Jozefo Gispert i St. Planeta 16 pul, Barcelona,

**Hungarujo:** Kelkaj skoltaj deziras koresp. Adreso: Zsámberger Michály Nagykörös, 1, ker Horti-Miklos ust. 4.

**Japanujo:** S-ro Masao Kato, Macumoto Ĉo 51. Kanazaŭna, per let. kaj il. post. pri diversaj temoj. S-ro Kitanihon-hironŝa, Enamimaĉi, Tojama Ken, Japanujo.

Pollando Skolto Kazimierz Sand, (studento) 20-jara, Stryj, Czarnieckiego 21. pri ĉio kaj kun ĉiuj. Unauvice kun bela kaj simpatia eksterlandano,

Redaktoro odpowiedzialny i wydawca: Emil Mayer.

Drukarnia »REKORD«, Kraków, Lenartowicza 6.